# TAMEN ★ PLU!

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO DECEMBRO 2006 / JARKOLEKTO 25

*Bob Felby - Tel (08) 8242 1460 - 6 Dorset St. Semaphore Park. S.A. 5019 - esperantobob@iprimus.com.au*

*Ankaŭ disponebla surrete ĉe la retejo de Esperanto en Sudaŭstralio: http://sa.esperanto.org.au*

***Iu frapas la pordon kaj panika voĉo kriegas: "S-ino Jones, vaporstratglatigilo surveturis vian edzon!"***

***"Enmetu lin tra la leterfendo, ĉar mi estas en la bankuvo!"***

## Edukado

**Se vi vere deziras lerni kiel senerare uzadi Esperanton, tiam trastudu pli ol nur unu fojon la verkon por la nova jarmilo: "Lingvaj Resondoj".**



**Tiu ĉefverko ate de la fama Esperantologo kaj nemalhavebla instruisto, kiu ĉiam invitendas, kaj aktivas, en niaj Somerkursaroj kaj Kongresoj, Marcelo Leereveld, haveblas nun de la verkinto, 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur $22,00.**

## Gravaj Esperanto-eventoj

**Merkredon la 6an de decembro en Clarence Park ekde la 18a horo ni celebros la 147an datrevenon de la naskiĝo de d-ro Zamenhof.**

**Bonestu ne forgesi kunporti manĝaĵon, trinkaĵon kaj donacaĵon!!!**

**La 22a Somerkursaro kaj Kongreso okazos en 2007 en Hobarto, Tasmanujo.**

***"Al kiu freneze kriegis via edzino pasintan vesperon?" demandis la scivolema najbaro.***

***"Ĉu hieraŭ vespere? Devas esti la hundo, kiu suferis tiom."***

***"Kompatinda besto, mi aŭdis, ke ŝi minacis forpreni de ĝi la ŝlosilon!"***

## Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio

**Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA) estas, kiel ĝia nomo implicas, tutmonda asocio, en kiu oni rekomendas kaj kuraĝigas ne nur vegetarismon, sed ankaŭ Esperanton.**

**TEVA havas membrojn en ĉiu lando de la mondo, tial ĝi estas tutmonda. Ankaŭ en Aŭstralio troviĝas tiaj homoj, kiuj preferas nutri sin per la donacoj de la naturo, anstataŭ nutri sin mortigante senhelpajn vivajn estulojn, kiaj la bestoj.**

**Nur unu el la avantaĝoj de vegetarismo estas tiu, ke oniaj ŝancoj por eviti kanceron kaj multaj aliaj gravaj kaj danĝeroj malsanoj estas multe pli grandaj. Tamen, pli ol persona saneco estas homeco kaj kompato al la bestoj, sed tio estas nur mia persona opinio, kiun neniu bezonas sekvi, se vi pretas akcepti la konsekvencojn!**

**Ŝajnas ke niaj membroj en Aŭstralio tute forgesis pagi siajn kotizojn al TEVA por 2006 kaj kompreneble ankaŭ por 2007. Baldaŭ aperos "Esperantista Vegetarano 2006", unu el la plej prestiĝaj eldonaĵoj en Esperantujo. Ĉiu paginto ricevos sian propran ekzempleron!**

**Tiuj el vi, kiuj scivolas pri vegetarismo, logiko kaj kompato bonestu sendi vian kotizon al via landa reprezentanto, Bob Felby, 6 Dorset Street, Semaphore Park, S.A. 5019, Aŭstralio esperantobob@iprimus.com.au Anticipe tre elkoran dankon!**

***"Kiel fartas via edzo?"***

***"Sed kara profesoro, mi ne estas edziniĝinta."***

***"Ho, via edzo estas do fraŭlo!"***

## Sur ok radoj al Haveno Viktoro



La 28an de oktobro 2006 estis ne tre varme kaj blovis sufiĉe forta vento. Post pli ol unujara prokrasto ni tamen ekskursis al Haveno Viktoro. Dekstre de ĝi ni surgrimpis la klifon Bluff, maldekstre de ĝi ni vizitis Port Elliot, kaj en la centro ni promenis al la ĉarma Insulo Granita. Vi certe komprenas, kiom bongustis post tiom da freŝaera marŝado plato da fiŝo kaj terpomfingroj!

Kaj kial la ok radoj? Ĉar Trevor, Katja, Indrani kaj Eileen veturis aŭte, Sandor kaj Helen spitis la venton sur siaj bicikloj.

*Katja Steele*

*"Mi ne emas viziti ges-rojn Jennings hodiaŭ vespere."*

*"Ankaŭ mi ne… sed kiam mi pensas pri tio, kiom ili ĝojos, se ni ne venos…"*

*"Jes, vi pravas… ni iru!"*

## Novaĵo bonega el Novsudkimrujo

Nia eĉ tre eminenta kaj laborema samideanino, tre respektinda, meritas multe da laŭdo.

Vendredon la 3an de novembro ŝi prelegis unu tutan horon en la universitato de Sidnejo pri nia preskaŭ perfekta lingvo, Esperanto.



Post la prelegado ŝi respondadis al multe da demandoj de la gestudentoj. Espereble ili nun memoras preskaŭ ĉion, kion ili lernis, kaj ke ili kiom eble plej baldaŭ eklernos ankaŭ Esperanton.

Sed ne nur tio, Nicole verkis longan artikolon en la *NSW gifted journal,* kiu tre baldaŭ estos publikigata!

*"Jam antaŭ dudek jaroj mi edziĝis, kaj ankoraŭ mi amas la saman virinon."*

*"Tio estas admirinda."*

*"Jes, kaj tre danĝera. Se mia edzino ekscios, ŝi mortigos min!"*

## Pri Radio Polonia

Mi ĵus parolis kun la redaktistoj de Pola Radio en Esperanto, kiuj petis min danki ĉiujn esperantistojn, kiuj skribis al la radio kaj al siaj polaj ambasadoj. La eĥo de la kampanjo estas jam aŭdebla en Varsovio. Nenio ankoraŭ estas findecidita, kvankam kelkaj certe premas por kaj kelkaj espereble premos kontraŭ la ĉesigo de la dissendoj en Esperanto.

En ĉi tiu momento estas esence grave ke la kampanjo de subteno fare de esperantistoj eĉ intensiĝu. Bonestu skribi en trankvila tono kaj interalie substreki pri:

- la avantaĝoj por Polujo (ne por Esperanto) pro la ekzisto de tiu redaktejo, el kiu multaj ricevas siajn informojn pri la lando;
- la subteno al Esperanto de la granda polo, la papo Wojtyla;
- la fakto ke Esperanto kaj esperantistoj daŭre interesiĝas pri Polujo, ek de la tempoj de Edmond Privat, kies agado favore al la renaskiĝo de Polujo dum la unua mondmilito estas konata;
- la fakto ke Esperanto estis por poloj elemento por havi pli da kontaktoj kun eksterlando en momentoj, kiam Esperanto estis ignorata, subpremata, kaj eĉ persekutata, kaj tiel ĝi kontribuis al la kreado de la nuntempa Polujo malfermita al la ekstera mondo.

Gravas ke vi skribu al la Polaj Ambasadoj en via lando kaj al la Prezidanto de Pola Radio,

Pan Krzysztof Czabanski,

Al. Niepodlegoci 77/87;00-970,

Warszawa; PL.

Krzysztof.Czabanski@polskieradio.pl

Nur kopiojn sendu al:

Pola Radio, Radio Polonia,

Esperanto-Radaktejo, OO-970 Varsovio, Polujo,

Esperanto@polskieradio.pl.

Dankon pro ĉio, kion vi faros.

*Amike, Renato Corsetti*

*Tre malfrue en la vespero iras hejmen ebriulo.*

*"Pardonu min, sed ĉu vi povas diri al mi, kiom da ŝvelajoj mi havas sur la frunto?" li demandas al preterpasanta noktogardisto.*

*"Sep", diras tiu, post iom da nombrado kaj multe da cerbumado.*

*"Bone, eĉ bonege, post nur du lanternfostoj mi estos hejme!"*

## Abio de Espero

De 1521 en la franca regiono Alzaco estas tradicio ornami la kristnaskan arbon.

La alzacaj asocioj de WINTZENHEIM-COLMAR lanĉas konkurson por infanoj kaj gejunuloj pere de Esperanto.

ORNAMU nian urban abion dum decembro 2006 per desegnaĵoj pri espero, paco, Kristnaskiĝo; poemoj en via nacia lingvo plus Esperanto; kantoj; fotoj; mane farita laboraĵoj ktp.

Viaj kontribuaĵoj estos fiksitaj sur la abion en la Halo de la urbocentro dum decembro. Sendu viajn verkojn antaŭ la 30a de novembro 2006 al:

TAKE – ESPERANTO, "Konkurso Abio",

90, Rue du Tiefenbach, F-68920 WINTZENHEIM-COLMAR, Francujo.

La konkursaĵojn vi povas sendi ankaŭ retpoŝte al: clbm@wanadoo.fr

PREMIOJ – La unuaj de ĉiuj kontinentoj ricevos po 75 eŭrojn, la ceteraj diversajn premiojn. (Informoj en diversaj Esperanto-gazetoj.)

*J. Catil el Franca, sekcio de ILEI*

*Senlaborulo vizitis la Savarmeon kaj estis savita. Nun li atestas en la savarmeejo antaŭ la multaj ĉeestantoj:*

*"Multajn jarojn mi drinkadis, batalis kaj amoris."*

*Malgranda maljunulino sidanta en la lasta benkovico stariĝis, kaj alproksimigis sin al la elirejo.*

*"Trankvile residiĝu, Emma, mi mencios neniujn nomojn!"*

## Projekto Indiĝenaj popoloj

Preter la atento de multaj homoj, indiĝenaj popoloj en ĉiuj mondpartoj perdas siajn kulturojn. Ĉu tio gravas al esperantistoj? La projekto opinias, ke kiam iu homgrupo perdas siajn kulturon, lingvon, aŭ vivmanieron, tiam la homaro malriĉiĝas. Ĉiu kulturo entenas sciojn pri la natura mondo kaj la homaro, kiuj valoras al ni ĉiuj. Ĉiu lingvo entenas aliron al la vivo kaj la estado.

La homaro, plejparte senscie aŭ senzorge, perdas erojn de sia homa riĉeco, kaj samtempe, multaj indiĝenaj popoloj bezonas helpon por gvidi siajn kontaktojn kun aliaj kulturoj. Projekto Indiĝenaj Popoloj malakceptas la perdon de la homa riĉeco, kaj subtenas la pacan kaj laŭvolan evoluon de indiĝenaj popoloj. Ankaŭ ni serĉas manierojn por informi al indiĝenaj popoloj kiel Esperanto povos kunigi ilin por reciproka respekto kaj subteno, kaj por kunuzado de ideoj kaj iloj.

Ĉu tio entuziasmigas vin? Ni esperas ke jes!

Por ekscii pli pri Projekto Indiĝenaj Popoloj (PIP), kontaktu: (S-ron Agavo Felker ejfelker@dslextreme.com

*Unu el la laboristoj aperis en la laborejo nur ĉirkaŭ la 10a horo.*

*"Mi petas vian pardonon", li diris, "ĉar mi malfruas, sed ne estis mia kulpo. Mia edzino naskis infanon ĉimatene"*

*"Tio estas tre malĝojiga novaĵo" diris lia laborkamarado.*

*"Kion vi volas diri per tio?"*

*"Ke estas malĝojige, ke ne estas via kulpo!"*

## Novjara mesaĝo de TEVA

**Floro ekburĝonanta simbolas la belecojn de kaj la naturo kaj juneco. Kaptante kaj ĝuante tiujn belecojn ni pluvivigas ilin en ni mem tiele kreante harmonion. Nutrante la junecon per beleco ni harmonie ekburĝonigas la novajn generaciojn.**

**Floroj kaj burĝonoj daŭre renoviĝos sur la Tero, kaj ankaŭ nia movado bezonas renoviĝon kaj novajn fortojn.**

**Porti mesaĝon eksteren de niaj centroj al tiuj, kiuj ankoraŭ ne konas la du verdajn vojojn, t.e. vegetarismo kaj Esperanto, estas la celo de nia movado. Kaj ĉiu TEVA-an(in)o portas per sia vivmaniero tiun mesaĝon.**

**Por pli disvastigi nian lingvon, kie oni ankoraŭ ne uzas ĝin, estis lanĉita la MONDA TAGO DE ESPERANTO, la 15an de decembro, kaj la TAGO ekmovas ne antaŭe viditajn fortojn kaj ideojn.**

**Imitinda, inter aliaj, estas la iniciato, kiun nia reprezentanto, samideanino Sandra BURGUES ROCA pasintjare realigis en Montevideo, Urugvajo.**

**Pliaj iniciatoj naskiĝis nun en Urugvajo kaj aliloke.**

**Lernejoj atendas Esperanto-instruistojn. Kiuj el ni atingis la Superan Nivelon kaj pretas instrui? Kaj multaj atendas esti informataj pri la avantaĝoj de nia lingvo.**

**Ni konstatis nuntempe, ke ekzistas serioza intereso pri vegetarismo kaj multaj scivolas pri nia vivmaniero. Estas do multego direnda kaj pruvenda.**

**Ni bezonas pli da spertuloj argumentantaj pri la valoroj de vegetarismo kaj esperantismo. Necesas profesie prelegi en kulturaj kaj sciencaj lokoj.**

**Tekstoj valoras, sed bedaŭrinde ne sufiĉas. Ni esperantistoj portas mem vivantan mesaĝon al aliiuj, kaj per tio ni montras la signifon de vegetarismo kaj Esperanto.**

***(El "Esperantista Vegetarano, 2006)***

***"En nia familio estas nur unu, kiu manĝas vegetare, regule gimnastikas, kaj neniam fumas, nek drinkas, kaj neniam maltrankviliĝas pro manko de mono!"***

***"Tian homon mi nomas sanfrenezulo!"***

***"Ĉu? En nia familio ni nomas lin Karlo!"***

## Baldaŭ restos nur unu parolanto

**Laŭ profesoro David Kristal formortos duono el ĉiuj lingvoj de la mondo. "Tio estas granda krizo, ĉar, el la proksimume ses mil lingvoj en la mondo, la duono estas tiom grave endanĝerigitaj ke ili verŝajne ne ĝisvivos la finon de la nuna jarcento. Ĉiu lingvo estas unika vizio pri la mondo. Ĉiu havas ion por doni al ĉiuj aliaj. Ju pli da vizioj pri la mondo, des pli oni komprenas la ideojn pri toleremo."**

**"Proksimume 60 lingvoj en la mondo jam havas nur unu parolanton. "Estas tiuj, kiuj estas en danĝero. Proksimume 96% el la lingvoj de la mondo estas parolataj de nur 4% el la loĝantaro." Li aldonis, "tamen, ke revigligi lingvojn ne estas malfacile, kondiĉe ke iliaj komunumoj volas, ke ilia lingvo transvivu. La plej bona maniero transvivigi lingvon estas per la premado de la politikaj instancoj, por ke tiuj ebligu al la parolantoj de la koncerna lingvo endanĝerigita, ke ili rajtu uzi sian lingvon iom oficiale, almenaŭ en sia regiono. La granda plivastiĝo de la franca kaj angla lingvoj en Afriko, de la rusa en la ekssovetaj respublikoj, de la portula kaj hispana en Latinameriko, kaj de la mandarena en Ĉinujo tamen starus sub risko, se la lokanoj komencus efektive plendi por la libera kaj oficiala uzado de sia loka lingvo flanke, kaj en kelkaj kazoj, super la t.n. 'prestiĝa lingvo de la lando.**

***Majko Leono***